

juna. amiko

Numero 69
94/2

INTERNACIA KVARONJARA LERNEJANA ESPERANTO-REVUO

Ni ekiras
per

tri-ĉeval-
pova aŭto...



Iru al la paĝo, kiu indikas vi-
an aĝon (se vi estas pli ol du-
dek-jara, iru ĝis paĝo dudek.)

INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTAJ INSTRUISTOJ

Por la plimulto de vi estas nun somero — ni ne iras ĉiu-tage al lernejo aŭ laboro, sed ĝuas feriojn — liberan tempon. Multaj el ni vojaĝas al ripoz-loko aŭ fora urbo. Kelkaj promenas en la montaro, pli aventuremaj tie rampas en kavernojn aŭ grimpas al monto-pintoj. Iuj preferas plonĝi en akvon, pro la somera varmo. En maro, lago aŭ rivero ili naĝas, aŭ promenas per rem-boato, vel-boato aŭ motor-boato. Aktivuloj sportas, per akvo-skioj, kajako aŭ velbreto. Aliaj biciklas, rul-sketas aŭ bret-sketas. Kelkaj falas.

Atingi ripoz-lokon, oni povas veturante aŭte, motor-cikle, trajne, buse, ŝipe (prame, al-ŝipe, ŝveb-ŝipe) aŭ aviadile. Tamen, multaj el niaj legantoj loĝas en la suda hemisfero de la mondo, kie nun estas vintro. Se ili ricevas ferion, ili povas glit-kuri sur glacia lago, sledi aŭ skii sur neĝaj monto-flankoj.

Ŝajnas, ke abundaj amuzaj manieroj estas iri. Vagu mem tra riĉa enhavo! Eĉ tra la paĝoj de via nuna numero de *Juna amiko* vi povas per unika ludo promeni kun grupo da amikoj. Vidu paĝon kvar por la ekiro, kie vi samtempe ricevos klarigon pri la misteraj kestoj sube sur ĉiu paĝo.

Imagu, *Juna amiko* finfine sukcesis fariĝi (almenaŭ ĉi-foje) movada revuo!

Kore salutas,

Via redaktoro

Stefan

Stefan MacGill
20 majo 1994.

Juna amiko,
internacia revuo por
lernejanoj kaj komencantoj.
Eldonata de Internacia Ligo de
Esperantistaj Instruistoj (ILEI)
Aperadas kvarfoje jare en
marto, majo, septembro
kaj novembro.



Redaktoro:
Stefan MacGill
Redakcia adreso: pf. 193,
IUU-1368 Budapeŝt, Hungario.
Nia konto ĉe UEA: juna-1
(ĉefe por peranta uzo)
ISSN 0230-1318

Abonprezo ĉe la
abonservo de UEA: 16 NLG.
Ĉe la kasisto de ILEI: 60 SEK. (B. Andreasson, Södra
Rörum pl. 455, SE-242 94 Hörby, Svedio, pŝk. 682117-7
(Stokholmo) En reform-eŭropo: 350 HUF aŭ 4 USD. aŭ 6DEM
En Hungario: 200 HUF (donacabono por eksterlandano: 350 HUF)
ĉe la hungara ILEI-sekcio: M Kovács, Ady Endre 23-25c, IUU-1221
Budapeŝt; konto OTP Budapeŝt XXII ker, fiók 546-006891-8.

Perantoj en tridek landoj; multaj ofertas naci-valutajn
abon-kotizojn. Plena listo de perantoj kaj kotizoj
aperas en nia tria numero ĉiujare.

Grandaj rabatoj (ĝis 50%) por
kvantaj mendoj.

Anoncoj:
Kvaronpaĝo: 400 HUF
enlande aŭ 40 NLG aŭ 4 jarabonoj
en aliaj okcidentaj valutoj. Duonpaĝo:
600 HUF aŭ 60 NLG. aŭ 6 jarabonoj.
Tuta paĝo: 800 HUF aŭ 80 NLG.
aŭ 8 jarabonoj.

Iru la paĝo 25+32-44+6-11.

La du-ŝtoneta fabelo

Antaŭ multaj jaroj estis riske pruntepreni monon. Se iu ne povis repagi la pruntitan mon-sumon, oni povis ĵeti tiun personon en malliberejon.

En tiu tempo vivis komercisto kun rave bela filino. Sed li ŝuldis grandan mon-sumon al maljuna kaj malbela mon-pruntisto. Li ne povis repagi la monon. La mon-pruntisto alvenis kaj starigis proponon: "Se mi rajtos edzinigi vian belan filinon, mi nuligos la ŝuldon." Tiu propono ŝokis kaj la patron kaj la filinon, kaj ili tuj rifuzis.

Do, la ruza mon-pruntisto modifis la proponon, dirante: "la sorto decidu. Mi metos du ŝtonojn en la malplenan mon-sakon. Unu ŝtono estos nigra, unu blanka. Via filino devos elpreni unu ŝtonon. Se ŝi elprenos la nigran, ŝi kaj mi geedziĝos kaj mi nuligos la ŝuldon. Se ŝi elprenos la blankan ŝtonon, ŝi estos libera kaj mi nuligos la ŝuldon. Se ŝi rifuzos elpreni ŝtonon, vi iros en malliberejon kaj ŝi estos sen-rimeda.

Malvolonte, la komercisto konsentis. Ili staris tiam sur ŝtoneta vojo en la ĝardeno de la mon-pruntisto. Li kliniĝis kaj prenis du ŝtonetojn. La knabino, akra-okula pro timo, rimarkis, ke li prenis du nigrajn ŝtonetojn! Ŝi volis protesti, sed ne kuraĝis. La mon-pruntisto etendis la sakon al la filino...



Jen dilemo! Kion ŝi faru? Ĉu vi povos trovi por ŝi solvon? Kion vi farus, se vi estus la filino? Diskutu tion kaj poste legu la solvon de la filino, kiun vi trovos aliloke en la gazeto.

VORTKLARIGOJ

prunti: doni ion, kiun oni devas poste redoni.

ŝuldi: havi la devon repagi mon-sumon aŭ redoni ion.

propono: sugesto, konsilo.

modifi: ŝanĝi.

malliberejo: karcero, prizono.

dilemo: malfacila problemo, en kiu oni devas elekti el du aŭ malmultaj solvoj.

Iru al la paĝo, kiu indikas la tagon de la semajno (lundo = 1, dimanĉo = 7).

SAG

PAĜO-VAGO!

unika ludo per la tute gazeto

En la mezaj paĝoj de *Juna amiko* vi trovos tabulan ludon. Ja, dum iom da tempo ni ne aperigis tian ludon, sed kelkfoje ni tion faris. Sed nun ni prezentas al vi duan ludon – certe unikan en la tuta dudek-du-jara historio de nia revuo. La tuta gazeto formas unu gigantan ludon! Ĝi estas kvazaŭ tabula ludo sen tabulo. Ĝi havas 32 spacojn, kaj ĉiu paĝo de la revuo reprezentas unu spacon. Sube sur ĉiu paĝo vi trovos en kadro instrukcion por tiu paĝo.

Ĉiu ludanto devas teni ekzempleron de la revuo, malferma komence je la nuna paĝo (kvar). La celo de la ludo estas promeni tra la paĝoj de la revuo por atingi la lastan paĝon – tridek du. Ĉiu devas ĉiam teni sian revuon malfermitan je la paĝo, kiun li aŭ ŝi okupas, montrante la precizan paĝon.

Se eble, estu gvidanto/decidanto, kiu ne estu ludanto, kaj kiu devas gvidi la ludon kaj decidi la rezultojn en dubaj kazoj. La ludantoj sidu en cirklo, la lud-vico estas al la dekstro. Sube ni klarigos, kiel elekti kiu rajtas unue ludi kaj kiel ek-ludi. Kiam estas la vico de ludanto, tiu devas laŭtlege sian instrukcion kaj (kun gvido de la gvidanto) plenumi la taskon. Laŭ la rezulto, tiu rajtos pluiri aŭ reiri al alia paĝo kaj atendi tie, ĝis denove estos lia aŭ ŝia vico.

Apud la gvidanto estu oficiala horloĝo, uzota por ĉiuj tempo-rilataj taskoj. Notu la precizan horon kaj minuton, kiam la ludo ekiras.

La gvidanto anticipe legu ĉiujn instrukciojn, kaj laŭbezone adaptu ilin al la aĝo kaj lingvo-kapablo de la ludantoj kaj al lokaj kondiĉoj (ekz. ĉe paĝo 21 necesos decidi kiel trakti nomojn en aliaj skrib-sistemoj, kaj kion latin-amerikano rajtas kompreni sub 'antaŭnomo'!)

Se ludanto devas jam trian fojon reveni al la sama paĝo, tiu rajtas tiam ignori la donitan instrukcion kaj simple antaŭeniri unu paĝon.

Por komenci la ludon: Ĉiu ludanto havu krajonon kaj paperon, prenu la vorton 'PROMENAS' (aŭ alian, kiun la gvidanto elektu), kaj ene de unu minuto skribu tiom da Esperantaj vortoj kiom eble, el ĝiaj literoj. Ĉiu antaŭeniru unu paĝon por ĉiu ĝusta vorto. Tiuj estos la komencaj pozicioj por ĉiu. Tiu, kiu skribis la plej grandan nombron da ĝustaj vortoj havos la komencan vicon – la vicoj sekvos laŭ la rondo de ludantoj, en dekstrenira direkto. La suba kadra instrukcio estas uzenda, nur se iu ludanto estas post la komenco de la ludo sendita al la kvara paĝo.

Senlima nombro da ludantoj rajtas okupi la saman paĝon. Gajnas tiu, kiu unua estas sendita al la tridekdua paĝo, aŭ, kiu rajtas preterpasi ĝin.


Amuzon kaj sukceson
ni deziras! EK!

Antaŭeniru tiom da paĝoj, kiom da gefratoj estas en via familio (Minimume unu, por vi mem!)

IRU TRA LA LABIRINTO AL LA TREZORO!

Komencu ĉe la sago, iru tra la labirinto ĝis la celo, la trezoro en la mezo. Se eble, ne desegnu la solvon! Tiam, vi povos poste montri la labirinton al amiko kaj vi klarigu al la amiko, kiel vi iris. Kontrolu, ĉu via amiko sukcesos sekvi viajn instrukciojn.

Ekzemple, mi nun provos. Mi eniras, tuj mi turniĝas dekstren, pluiras,



turniĝas maldekstren kaj trairas la pordeton kaj turniĝas maldekstren denove. Mi pluiras ĝis la angulo, turniĝas dekstren kaj iras supren. Antaŭ la barita vojo mi turniĝas dekstren, trairas la pordeton, turniĝas maldekstren kaj ... haltas ĉe blinda (sen-elira) vojo. Do mi turniĝas komplete kaj reiras, turniĝas maldekstren kaj .. ho, ve, dua sen-elira vojo. Mi plene malsukcesis! Ĉu vi povis sekvi mian vojon, kaj indiki kie mi staras kaj sen-trezore ploras?

KIEL IRAS...

ŜERCO

— Paĉjo, Paĉjo, kial mi ĉiam paŝas en cirklo?

— Silentu! Alie mi najlos ankaŭ vian alian piedon al la planko!

1. Akrobato
2. Klaŭno
3. Heliko
4. Fulmo
5. Ebrulo
6. Araneo
7. Baledistino
8. *Superman*
9. Centpiedulo kun ligna kruro

- A: Sur fadenoj.
 B: Fluge.
 C: ...98, 99, Plonk!
 Ĉ: Sur la manoj.
 D: Sur la pied-pintoj.
 E: Tre malrapide.
 F: Tre rapide kaj zig-zage.
 G: Per monociklo.
 Ĝ: Malrapide kaj zig-zage.

Iru al la paĝo, kiu indikas la nunan monaton (januaro = 1, majo = 5, decembro = 12)

Paĝoj de Lukasz Sokół

Ni ricevis intervjuon kaj enigmon de 13-jara Lukasz Sokol el Ruda Slaska en Pollando. Ni ricevis tradukojn de 14-jara Lukasz Sokol el la sama urbo. Kaj ĵus ni ricevis solvon al konkurso de 15-jara Lukasz Sokol. Ĉu temas pri tri sam-nomaj legantoj? Ne, temas pri unu fidela kaj persista leganto, kiu ĉiujare sendas al ni ion. Li progresas en la lingvo kun la helpo de la respektive 65-, 66- kaj 67-jara avino Aurelia.

Ial ni ne trovis spacon por la pli fruaj kontribuajoj, do fine por kompensi tiun mankon, ni donas du tutajn paĝojn al la tri Lukasz-oj (kaj malrekte al la tri avinoj!) Unue, jen intervjuo inter la 13-jara knabo kaj la avino el 1992:

A: Kial vi ŝatas Esperanton?

L: Mi ŝatas ĝin, ĉar post kvar-monata lernado, jam mi kapablis iom interkompreniĝi en tiu lingvo.

A: Kiuj eventoj estis ĝis nun plej gravaj por vi?

L: Plej gravaj estis la renkontiĝoj kun esperantistoj, ĉefe la partopreno en la 77a Universala Kongreso en Vieno.

A: Ĉu korespondado en la internacia lingvo estas por vi agrabla aŭ ĝena?

L: Korespondado estas por mi interesa, ĉar mi povas multe ekscii pri la landoj kaj ĉirkaŭaĵoj de miaj korespond-amikoj. Al redakcioj de revuoj por infanoj kun plezuro mi sendas solvojn de la taskoj kaj konkursoj.

A: El kiuj landoj estas viaj korespond-amikoj?

L: Ĝis la pasinta jaro mi korespondis kun gelernantoj el diversaj eŭropaj landoj, ekz. el Hungario, Hispanio, Nederlando kaj el Pollando. Ĉe niaj amikoj el Tuchola eĉ ni pasigis du semajnojn dum someraj ferioj; tiam ni kune multe kantis esperantajn kanzonojn, kiujn mi lernis en Miedzygórze, tiutempa feriad-loko por esperantistoj. Dum la UK en Vieno mi gajnis ankaŭ plenaĝajn korespond-amikojn el Japanio, Germanio kaj el Eburio en Afriko.

A: Kio el la esperanta literaturo konata al vi plej plaĉas al vi?

L: Krom la poemoj de Zofia kaj Esperantina Mirska, la satiro de Raymond Schwartz *Estas mi, esperantisto*, kiun mi tre ŝatas deklami parkere.

A: Ĉu vi intencas plu okupiĝi pri Esperanto?

L: Jes, Mi deziras tiom bone ekregi la lingvon, kiel ekregis ĝin, krom denaskaj esperantistoj, ekzemple la junuloj, kiuj prezidis la kunvenon de TEJO (la junularo) dum la 77a UK.

A: Mi deziras al vi sukceson, kaj mi volas helpi vin persisti en la intenco!

* * * *

Se vi estas knabo aŭ viro iru antaŭen tri paĝojn, se vi estas knabino, iru malantaŭen tri paĝojn.

Sampaĝe kun la intrervjuo, la 13-jara Lukasz sendis la sekvan enigmon:

Kiu fraz-fino aŭ respondo estas konforma al ĉiu fraz-komenco aŭ diro?

- | | |
|-------------------------|--------------------------------|
| 1. Telefonu al mi! | A: En Budapeŝto. |
| 2. Ni iru promeni! | B: Bone, mi lavos min. |
| 3. Mi volonte naĝas. | C: Paĝon 12. |
| 4. La kato... | Ĉ: Mi volas pentri. |
| 5. La poŝtkarto... | D: Kiu estas via numero? |
| 6. Jen akvo. | E: ...kaj la muso. |
| 7. Kie vi loĝas? | F: ...kun kvin fingroj. |
| 8. Legu! | G: ...kun poŝtmarko. |
| 9. La mano... | Ĝ: Kiam kaj kien? |
| 10. Donu al mi penikon. | H: Multan plezuron en la akvo! |



La solvon vi trovos poste en la revuo.

* * * * *

La 14-jara Lukasz sukcesis solvi la 3-literan kruc-enigmon sur paĝo 10 de nia numero 93:4. Li trovis la sennumerajn vortojn kaj afiksojn: al, -ul, -er, -aĉ kaj iu. Li sukcesis kunmeti ilin en mirinde koncizan frazon:

Iu aĉulo donis al mi moneron.

Respondis ankaŭ la avino per du mirinde mal-koncizaj frazoj!

* * * * *

Nun la 15-jara Lukasz respondas al nia invito sur paĝo 31 de la antaŭa numero kaj prezentas rakonteton verkitan per la specialaj verboj, kiujn ni volas emfazi en la ĉi-jara kolekto:

Nia malgranda kato ŝatas kuri, salti kaj digno-plene paŝi.

Ofte ĝi imagas, ke ĝi ĉasas muson. Ĝi rampas, trovas la lanan volvaĵon, saltas, tiras ĝin, puŝas kaj ŝovas.

Sed, ho ve! Ni perdis nian katon! Kial ĝi forkuris de ni?

Ĉu ĝi serĉas katinon? ... Mi supozas kaj kredas, ke ĝi trovas katinon kaj post kelkaj tagoj revenos al ni.

Kaj jen kelkaj proverboj, kiuj uzas tiujn verbojn:

Ne ŝovu la nazon en fremdan vazon!

Kiu bati deziras, trovas bastonon.

Ne opiniu vin saĝa.

Ne diru 'hop!' antaŭ la salto!



Pro tiuj solvoj ni sendas la trian kajeron de *Tendaraj tagoj* antaŭ ol li fariĝu 16-jara!
Dankon kaj gratulon!

Se vi naskiĝis en la ĉefurbo de via lando, iru antaŭen ĝis paĝo dek. Se ne, reiru al paĝo kvin.

Plia kanto (pri irado!) el la kantaro de s-ro Jon Rømmesmo el Norvegio:

GAMBOJ, BRAKOJ KAJ KAPOJ



Jen ni ler-te ku-ras per la gam-boj,



Jen ni mar-ŝas: u-nu, du, tri, kvar,




Pa-ŝas pi-ed-pin-te en la ĉamb-roj,



i-ras sur la plan-doĵ ĝis ek-star'.

2. JEN NI LERTE SVINGAS AMBAŬ BRAKOJN,
UNU, DU, TRI, KVAR, KVIN, TIEL ĈI.
FARAS NI KARESOJN KAJ ATAKOJN.
JEN NI LUDE BOKSAS, VI KAJ MI.



3. JEN NI LERTE NOMBRAS PER LA KAPOJ,
UNU, DU, TRI, KVAR, KVIN, SES, SEP, OK.
ENE ESTAS PENSOJ KAJ IMAGUJ.
NI PER LANGO JESAS, KAJ JEN STOP!



(NI ALDONAS NAŬ KAJ DEK
KAJ ALVENAS AL LA STREK'.

Diru aŭ skribu tiom da vortoj en Esperanto kiom vi povas en unu minuto, kiuj enhavas la literojn OK. Antaŭeniru tiom da paĝoj.

Esperantaj novaĵoj

Kiam ni prezentas informojn pri Esperanto, ni ofte mallongigas tiun vorton nur al 'E'. Tion ni faros sube!

E-Muzeo en Samarkando

La Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro en la antikva 2500-jara urbo Samarkando serĉas partnerojn, kunlaborantojn kaj subtenantojn en la tuta mondo. Samarkando estas en Uzbekistano en Centra Azio. La muzea kolekto ampleksas (enhavas) pli ol 15.000 diversajn aĵojn el 100 landoj pri universalaj homaj valoroj kaj la plej viv-gravaj mond-skalaj problemoj. Oni korespondas Esperante, angle, uzbeke kaj ruse. Kontakto: La Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro, P.O. Box 76, 703000 Samarkando, Uzbekistano, Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj.

La Muzeo anoncas 'rideto'-konkurson. Sendu vian ridet-aĵon (foton, desegnaĵon, printaĵon) ĝis la fino de 1994. Plie en aŭgusto ĝi organizos letervesperon kaj volonte ricevos saluleterojn kaj poŝtkartojn. La plej interesajn ili publikigos en la uzbeba gazetaro.

Rok-gazet'

Jes, aperas en Esperanto rok-gazeto. En ĝi vi ne legos pri ŝtonegoj (krom eble tiuj, kiuj ruliĝas!). La gazeto prezentas rok-muzikon kaj diversajn formojn de moderna kaj populara muziko. Ĝia sesa numero aperis en januaro 1994. Ĝi aperas proksimume du-foje jare. Ĝi havas pli

da paĝoj ol nia *Juna amiko* (44) kaj tiuj paĝoj estas duoble pli grandaj. La kovriroj estas kolore presitaj, la tuta gazeto estas presita sur bona rebrila papero, kun multaj fotoj kaj viglaj desegnaĵoj. La gazeto prezentas ĉefe E-rokon — ni havas plurajn aktivajn muzik-grupojn, kiuj verkas kaj kantas en Esperanto, ekzemple: *Persone* kaj *Amplifiki*.

La lasta numero prezentas artikolon pri la komputila muzikiga programo MIDI, intervjuon kun la E-kantistoj Nataša kaj Ĵomart, raporton pri la kvara Kultura E-Festivalo en Kopenhago (Danlando) pasintjare kaj intervjuon kun la franca E-kanzonisto Ĵak Le Puil, eldoninto de kvar son-kasedoj en Esperanto. La gazeto ĉiam aperigas recenzojn pri novaj sonkasedoj, kompakt-diskoj kaj videoklipoj, kiuj aperas en Esperanto.

Abono por *Rok-Gazet'* validas por kvar sinsekvaj numeroj (ne por kalendaraj jaro) kaj kostas 35 NLG (nederlandajn guldenojn), 100 FRF (francajn frankojn) aŭ 20 USD (usonajn dolarojn). Pli moderaj kotizoj validas por homoj en malpli bon-stataj landoj. La gazeto havas konton ĉe UEA: rokk-b. Sed anoncu vian abonon, aŭ petu informojn kaj eble specimenon de la redakcio: EUROKKA, FR-31450 Donneville, Francio; tel. +31 6181 9565.

Ĵamborea lingvo denove

Delonge ekzistas skoltoj, kiuj uzas Esperanton por siaj internaciaj kontaktoj kaj ili havas la propran asocion, Skolta E-Ligo (SEL). Ĝi havas

Iru al la paĝo, kiu indikas la nombron da minutoj pasis post la lasta plena horo, aŭ kiom restas ĝis la venonta horo. (Do, maksimume 30!)

regulan gazeton, kiun oni nun pretigas en Finnlando kun nova kaj bela aspekto. Same kiel *Juna amiko* ĝi aperas kvarfoje jare. Oni povas membriĝi en SEL ĉe la kasisto, s-ro David Withey, 21 Brookfield Ave, Waterloo, Liverpool, Britio, L22 3YE aŭ ĉe perantoj en dudek landoj. La UEA-konto de SEL estas selx-m.

La baza libro de la skoltoj dum multaj jaroj estas *Ĵamborea Lingvo*, kiu helpas al skoltoj lerni Esperanton en tiu formo, kiu plej utilos por internaciaj skoltaj renkontiĝoj (ĵamboreoj). Ĝi unue aperis en 1968, sed oni devis reeldoni ĝin kelkfoje kun novaj paĝoj. Ĵus aperis tute nova eldono, prepare por la Eŭropa Ĵamboreo en 1994 kaj la Monda Ĵamboreo en 1995, kiuj okazos en Dronten, Nederlando.

La libro prezentas 117 mallongajn unuojn aŭ partojn. La ĉefrolantoj estas ses skoltoj el unu patrolo. La unuoj prezentas ne nur la E-gramatikon, sed la necesajn frazojn kaj vortojn por komuniki pri kaj en la ĉiutaga vivo, kaj en la skolta mondo. Ili prezentas la skoltan uniformon, la skoltan devizon, promeson, leĝaron, terminojn kaj tiel plu. Bildoj helpas la komprenon; ilin pretigis la filo de la aŭtoro, Melle Hammer.

La libro taŭgas ankaŭ por memlernado kaj rekt-metoda instruado. La vendoprezco estas 6 NLG ĉe la aŭtoro kaj SEL-representanto: s-ro J.K. Hammer, Postbus 433, 1500 EK Zandaam, Nederlando.

Verkita surbaze de recenzo de Gyöngyi Mézes (Perlo Miela) por IPR.

Iru al la paĝo, kiu indikas la nunan tagon de la monato.



PAPER-PUPOJ POR ELTONDI

Agrabla kaj bele prezentita materialo atendas vin, se vi nur skribos al adreso en Usono. Unu koverto prezentas titolon *La Mus-truo*, alia *Kial la homoj ne manĝas florojn*. Ene vi trovos dek-ses paĝan libreton, kiu prezentas fabelon, sekvata de alfabetita vortlisto. Aldone estas kartona folio kun bildo de kuniklo aŭ muso, sur alia vestaĵo por eltondi kaj aldoni. Tria folio prezentas buntan arbon aŭ kastel-pordegon, kiuj servas kiel fona dekoraĵo. Por senpage ricevi tiujn paketojn, skribu al la verkinto: Agavo Felker, 414 E. Cedar #9, Burbank, CA 91501, Usono.



Sentitola.


Al mia forega leteramikino.

Neniam la suno kaj luno
 Povas kisi unu la alian sekrete?
 Nenie la ĉielo kaj la mar'
 Povas brakumi reciproke sin kviete?

Iam la suno kaj la luno
 Povas kisi unu la alian sekrete.
 Ie ĉielo kaj la mar'
 Povas brakumi reciproke sin kviete.

Kiam la suno kaj luno
 Povas kisi unu la alian sekrete?
 Kie la ĉielo kaj la mar'
 Povas brakumi reciproke sin kviete?

Dum la sun-eklipso, la suno kaj la luno
 Povas kisi unu la alian sekrete.
 Ĉe la horizonto, la ĉielo kaj la mar'
 Povas brakumi reciproke sin kviete.



Stil-klarigo: Tiu poemo adoptas versformon de ĉinaj popol-eklogoj: popularaj vortoj sen titolo, ripetaj versa-skeletoj, metaforaj demandoj kaj respondoj.

Feng Da-Qing Ĉinio.

Antaŭeniru tiom da paĝoj, kiom estas personoj en la ĉambro.

Kiu iru kien?


La bildo sube prezentas grupon da mebloj (ses) kaj familian grupon (avo, tri infanoj kaj kateto). Sed la katastrofa sorĉistino el *Tendaraj tagoj* klopodis transformi la junulon al rano, por ke ŝi kisu lin kaj poste edziniĝu kun li kaj fariĝu princino. Sed, kiel kutime, ŝia sorĉaĵo fuŝiĝis. Ŝi sukcesis nur flugigi la meblojn kaj faligi la homojn. Provan-te ripari tion, ŝi nur malapere-rigis sin mem.

Via tasko estas ripari la fuŝon. Unue, donu nomon al ĉiu familia-no, kaj nomu la meblojn. Diru, kien de-vos reiri ĉiu familia-no kaj kion ili estis farantaj antaŭ la mis-sorĉa momento.

(kontribuis
Kovács
Márta)

Kien iras...

- | | |
|-----------------------|-----------------------|
| 1. ŝipo | A: Al fromaĝo. |
| 2. trajno | B: Al konstru-tereno. |
| 3. aviadilo | C: Al haveno. |
| 4. rakedo | Ĉ: Al poŝt-kesto. |
| 5. beton-kamiono | D: Al flug-haveno. |
| 6. telfero | E: Al Holivudo. |
| 7. muso | F: Al la luno. |
| 8. esper-plena aktoro | G: Al stacidomo. |
| 9. letero | Ĝ: Al monto-pinto. |



Antaŭeniru tiom da paĝoj,
kiom da tagoj de la semaj-
no vi povas nomi en Es-
peranto.

Unu tagon, en la arbaro ...



- Kio ĵus okazis en la arbaro? Kiajn bruojn oni ĵus aŭdis? Kial la dua sinjoro estas malgaja?
- Kial ni bezonas arbojn kaj arbarojn? *Donu kelkajn respondojn.* Ĉu ni povus vivi sen arboj?
- Nomu la bestojn, kies vivojn la arbo influis. Kiujn kondiĉojn bezonas tiuj bestoj por bone vivi?
- Kial tiuj bestoj bezonas arbojn? Kiuj bestoj vivas en arboj?
- Kial homoj volas falĉi arbojn? Kial aliaj homoj volas protekti arbarojn? Kion ili faras por protekti ilin?
- Kio estas 'ekologia studo pri la efikoj sur la medio'? En kiuj cirkonstancoj oni devas fari tian studon?
- Kial oni devas fari ĝin? Kiu devigas tion?
- Kiam oni devas fari ĝin? Kiu estas la mesaĝo de tiu ironia bild-ŝerco?

Solvo por la dilemo de la ŝtonetoj

kiun ni prezentis sur paĝo tri.

La filino vidis, ke la mon-pruntisto metis du nigrajn ŝtonetojn en la sakon, sed la patro ne vidis tion. La filino ne protestis, kaj rapide elpensis solvon, kiu savos sin kaj la patron.

Ŝi enmetis sian manon en la sakon kaj komencis elpreni ŝtoneton. Sed ĉe la rando de la sako, ŝi tremigis sian manon, por ke la ŝtono glitu tra siaj fingroj kaj falu sur la vojeton.

"Ho, ve! Kiom mallerta mi estas!" ŝi kriis: "Mia mano tremis pro timo! Kaj nun ni ne scias plu, kian ŝtonon mi elprenis!" Efektive, la faligita ŝtono kuŝis inter miloj da aliaj sur la vojeteto.

"Ne gravas," daŭrigis la filino: "Ni povas scii la koloron de la elprenita ŝtono! Sufiĉas rigardi la koloron de la ŝtono, kiu restas en la sako!"

La mon-pruntisto ne povis rifuzi tiun argumenton, sen malkaŝi sian trompon. Kaj la ŝtoneto en la sako estis kompreneble nigra.

La komercisto ĝojis, ke li havas tiom lertan kaj rapid-pensan filinon!

rando: ekstera parto
argumento: konvinka diro
trompo: malbona faro

tremigi: kaŭzi, ke io tremu.
faligi: kaŭzi, ke io falu.
daŭrigi: kaŭzi, ke io daŭru.
faligita ŝtono: la ŝtono, kiun oni faligis.
elprenita ŝtono: ŝtono, kiun oni elprenis.
pruntita sumo: sumo, kiun oni pruntis.

Kio estas...
propono, kiun oni nuligis?
ideo, kiun oni forgesis?
argumento, kiun oni rifuzis?
espero, kiun oni perdis?
solvo, kiun oni trovis?
prunto, kiun oni repagis?
homo, kiun oni trompis?
homo, kiun oni liberigis?
ŝtono, kiun oni prenis?
sako, kiun oni alportis?
sukceso, kiun oni spertis?



Nomu tiom da ĉefurboj en Esperanto kiom vi povas dum unu minuto. Se malpli ol kvin, reiru al paĝo 10. Se inter ses kaj dek, pluiru al paĝo 20, se pli ol dek unu, iru al paĝo 24.

Mirinda tabulo-ludo sekvos!

Jes, tia ludo aperos sur niaj mezaj paĝoj, kian ni neniam ĝis nun sukcesis aperigi en nia revuo! La lud-reguloj estas mem-evidentaj, sed ĉiu spaco havas la formon de bobelo, kaj tiuj bobeloj kaj la skriboj estis kreitaj per nia komputilo. Iom post iom via redaktoro lertiĝas en la uzo de komputilo. Memoru, ke la antaŭa numero de *Juna amiko* raportis pri la uzo de komputiloj por desegni. La bildoj en la ludo tamen ne estas komputilaj – ili estas hom-faritaj – de Pavel Rak, prenitaj el *Tendaraj tagoj*.

Por ludi, vi bezonas ŝet-kubon, markilon por ĉiu ludanto kaj pakon da kartoj. Antaŭ ol ludi, vi devas pretigi serion da kartoj el kartono, kun instrukcio sur ĉiu. Sube ni sugestas kelkajn instrukciojn, sed vi rajtas mem grupe elpensi instrukciojn, kiuj estas amuzaj, interesaj aŭ diablaj por vi mem.

Por ekludi, decidu la ludo-vicon kaj ludo-direkton. Ekiru de EK. Gajnas tiu, kiu unua atingas aŭ pasas la spacon FINO. Se vi atingas bobelon kun instrukcio, sekvu ĝin. Vi rajtos pluiri aŭ vi devos reiri. Se vi atingas bobelon kun instrukcio PRENU KARTON, vi devas preni karton kaj sekvi ĝian instrukcion. Remetu la karton sube de la stako. Se pro la karta instrukcio vi atingas spacon kun alia instrukcio, vi devas tuj ankaŭ ĝin sekvi.

MULTAN AMUZON!

Nomu kvar ĉef-urbojn. Se vi sukcesos pluiri 4 paŝojn. Se ne, reiru 4.

La ludanto plej proksima al la FINO devas reiri kvar paŝojn.

Prenu la rapid-trajnon TGV kaj antaŭeniru ok paŝojn

Interŝanĝu lokon kun la ludanto tuj antaŭ vi sur la tabulo.


La plej juna ludanto rajtas pluiri kvin paŝojn.

Tro longe vi studis Esperantajn verbojn. Iru tuj al la ripoz-loko por refortiĝi.

Pluiri tiom da paŝoj kiom da transportiloj vi povas nomi (maksimume ok)

La ludanto en la lasta loko (plej proksima al EK) rajtas pluiri ses paŝojn.

Kiom el la sekvaj mallongigoj vi povas diri plene? Antaŭeniru tiom da paĝoj: ILEI, TEJO, IFEF, UEA, IEMW, SAT, IJK, KSM, REF, UK, KCE, IPR, ICLM.



Montru vian mentonon. Se vi kapablas, iru al paĝo 20, se ne 13.

Iru al la paĝo post tiu, kiun via dekstra najbaro okupas.

Ni iras unu-lige!

En ĉi tiu numero ni multe venis kaj iris. La verboj, kiuj priskribas manierojn iri estas preskaŭ ĉiuj unu-ligaj (ne-transitivaj). Al ili oni ligas rekte nur la subjekton de la frazo, por indiki KIU aŭ KIO iras.

Petro

kuras.

Mi

naĝas.

Li

biciklas.

Atentu! La vort-ordo en Esperanto estas tre libera. La subjekto ne devas ĉiam stari antaŭ la verbo! En Esperanto, precipe kun iuj unu-ligaj verboj, ĝi pli ofte staras post la verbo! Kie ajn ĝi staras, ĝi restas la subjekto kaj do ne portas la -N finaĵon, kiu apartenas al la objekto kaj al la du-ligaj verboj. Vidu la liberan vortordon:

Venas

Natalio.

Trajno

rapidas.

Rapidas

la trajno.

Kiam ni uzas unu-ligajn verbojn, ni kompreneble rajtas fari frazojn kun pli ol nur du vortoj! Por indiki la celon de iro, uzu la prepozicion AL:

Adelo

skias

al

la restoracio.

Se ni volas informi pri la instrumento aŭ ilo, kiun ni uzas por iri, ni kutime ligas tiun informon al la verbo per la prepozicio PER:

Ištvano

veturos

per

aviadilo.

Se ni volas informi pri kun-irantoj, ni kutime ligas tiun informon al la verbo per la prepozicio KUN:

Adelo

alvenis

kun

okdek kukoj.


Kiom da transportiloj vi povas nomi ene de minuto? Se malpli ol kvin, reiru al paĝo 11. Alie, antaŭeniru tiom da paĝoj, kiom da transportiloj pli ol kvin vi nomis.

Kanto de iranto

Refreno



Sur la ter', en a-er' ĉi-u mo-vas sin kaj pa-sas.



Sur la ter', en a-er', eĉ en ak-vo, es-tas ver'. Fino



1. Per-pi-e - de ve-nas hom', sed for-i-ras pro mal-bon'.

2. Hom' vojaĝas ĉirkaŭ Ter',
Li nomiĝas: pasaĝer'.

9. Glute glitas la serpent',
En ĝi mankas pia pent'.

3. Nun konkuras la kurant',
Lia pen' ne estas vant'.

10. En la akvo naĝas fiŝ',
Por ĝi ne konatas viŝ'.

4. Bravas grimpi sur la mont',
Retiriĝi estas hont'.

11. Tere saltas la passer',
Ĉu ĝi timas en aer'?

5. Rajdi ŝatas la ĵoke',
Sed falinte ĝemas: ve!

12. En aero flugas bird',
Vidu, kia bela bild'.

6. Knab' se akompanos vin,
Gardu vin, ho junulin'!

13. Birdoj flugas en aer',
Proksimiĝas al ĉiel'.

7. Jen galopas la ĉeval',
Kuras ĝi tra l' mont' kaj val'.

Atentigo: la strofoj estas kanteblaj laŭ la tria melodi-linio. Verku vi mem ankoraŭ pli! Sendu ilin al ni!

8. Tere rampas krokodil',
Ĝia dent': danĝera il'.


Mézes Gyöngyi (Perlo Miela)

Kalkulu la butonojn sur la ĉemizoj kaj bluzoj portataj de vi kaj viaj du najbaroj. Al la tioma paĝo vi iru.

AL ĜANGAL'!


Stefan
MacGill

Mang-donanto en la best-gardeno
Refermis pordon de simia kaĝ'
Kun tute malsufiĉa peno.
Goriloj kun aŭdaco kaj kuraĝ'
Incitis kaĝularon al eskap'
Kaperis ili la turistan trajnon
Ĉimpanzo estris kun stirista ĉap'
Promesis ĝi libero-gajnon.




Gardisto el gazeto lante
Levis kapon por rigard' kontrola
"Ankoraŭ unu greco vizitante
Turista – besta – same drola"
Al kolego ŝercis li kun mok'
"L'aspekto diferencas ete"
Donante puŝon al ĉef-porda hok'
Malfermiĝis ĝi komplete!

Tra la urb' la bestojn trajno tiris
Atenton vokis per svingad' de tukoj
Urbanoj pri la pasageroj miris
Okule gapis per kaŭĉukaj nukoj
Precipe kiam la krokodilo stiris
"Ba! Verŝajne nur reklamaj trukoj"
Ĉion-sciulo kun ciniko diris
"Por vendi pli da frukto-sukoj"
"Certe!" ridis la spektintoj – kaj foriris



Kiom da minutoj la ludo jam daŭras? Al la tioma paĝo vi iru. (Se ĝi daŭras jam dum pli ol 32 minutoj, vi aŭtomate gajnas!) Gratulon!



Unuanimis la verdikto:
 "La urbon ni kun dank' forlasu
 Kaj por evito de konflikto
 — ni reciprokajn kapojn ne frakasu —
 Decidindas per voĉdono demokrata
 Ĉu celi al arbaro, stepo, pusto
 Ĉu al tereno monta, ĉu ebenaĵo plata
 Kia estos la komuna gusto?"

"La ĝangala solvo evidentas"
 sonis besto-kant' ĥorusa,
 Nur la urso blanka disidentas —
 "Estu celo multe pli polusa!"
 Pro sunbrilo forta ĝi suferas.
 Viŝante ŝviton de la brov'
 Deklaras ĝi: "Mi ombbron pli preferas
 Plaĉegus plej al mi eltrov'
 De klimata zon' pli milda."
 Aldonante pro gvidilo voja
 "Kontraŭe al direkto ŝilda."
 Sed vanas eĉ protest' refoja.



"Ne estas mi kompatto-manka"
 Konsolas krokodil' kun larmo
 "Por nia urs-minoritato blanka
 Maltaŭgos tute la ĝangala varmo.
 Liberigu tuj vagonon lastan
 En antaŭaj intimiĝu pli
 Ni kreu voste varo-spacon vastan
 Poste dum momento flankeniru ni
 Ĉar solvon al dilem' mi vidas
 Dankon al moderna industri!"
 Kaj fabrik-terenon tuj li gvidas.




Reiru tiom da paĝoj, kiom estas literoj en via unua antaŭnomo (nacilingva formo)
 kaj pluiru kiom da paĝoj, kiom estas literoj en via familia nomo. Ekzemple, *Bartho-
 lomew Hill* reiros sep paĝojn, *Joe Huggingsbottom* pluiros 11.



En turisto-trajna kaso kuŝas kapitalo
 Fabrikestro dubas ĉu al besto vendi
 Sed mem li estas profitema animalo
 Kaj invitas sen protesto mendi.
 Komercente, ĉiuj arde bon-deziras.
 Blekante, bestoj adiaŭas al fabrik'
 Lamas trajn', ĉar ĝi kun krom-pez' iras
 Koko kuraĝigas per ŝrika kokerik'!

La besto-grego kaj vararo
 Afriken iras kaj ĝangalon trovis
 Nord-oriente de Hararo
 Bonan halto-lokon elekti provis
 "La serĉata senarbejo ne nur larĝu
 Estu per kurent' elektra ekipita.
 Tion trovinta, la varojn ni malŝarĝu
 Kaj enŝaltu, sen pane' cirkvita.
 Pord-aperte ili ronde staru
 Simbole al la besto-solidaro pleja.
 Konvenejon por la urs-amiko faru
 Ĝi ĝojos en oaz' frid-uj-ar-eja!



VORTKLARIGOJ:

peno: energio, klopodo
 aŭdaco: riskemo, braveco
 inciti: provi konvinki
 kaperi: preni per ruzo kaj forto
 lante: malrapide
 grego: besto-grupo
 drola: strange amuza
 truko: lerta faro por trompi iun
 ciniko: mal-entuziasmo
 unuanimi: esti en konsento sen escepto
 verdikto: formala decido
 reciproka: de ambaŭ flankoj en disputo
 frakasi: rompi forte
 evidenti: esti klare komprenebla
 disidenti: havi malsaman opinionon

Kiom da minutoj la ludo jam daŭras? Se malpara, reiru al paĝo 19, se para, pluiru al paĝo 26.

al plimulto
 minoritato: malplimulto
 intimiĝi: fariĝi pli proksimaj kaj amikaj
 dilemo: malfacila problemo
 kapitalo: mono uzebla por iu projekto
 animalo: besto aŭ homo, kontraste al vegeta-
 ĵo kaj mineralo
 lami: ne plovi bone iri
 ŝriko: akra orel-ataka sono
 paneo: misfunkcio
 cirkvito: sistemo de elektraj dratoj
 apera: malfermita
 solidaro: kun-sento por homoj (aŭ bestoj!) en sama specio, tribo aŭ grupo.
 konvena: taŭga
 oazo: normale akva kaj arbo-hava loko en dezerto, sed ĉi tie malvarma loko meze de ĝangalo..
 frida malvarma
 fridujo: apartato kuireja, kiu tenas varojn malvarmaj.
 fridujaro: kolekto de tiuj aparatoj
 fridujarejo: loko formita, kiam onbi metas aron de tiuj aparatoj en cirklo!

Kongreseto estis
gaja
infana,
en kiu Ana
naskiĝtagon festis.

Gratula kiso
nature venis
kaj ni promenis,
kiel kamaradoj,
laŭ sunaj padoj
ĉe la marbordo,
kun geamikoj
el sudo kaj nordo.

Mi nur
ne komprenis,
kial ŝi tenis
mian manon
en siaj manoj
pasie, varme,
kaj kial infanoj
ridante svarme
nin ĉirkaŭkuris
kaj vete ĵuris,
ke ni fariĝos
geedza paro!

Savu min,
ho blua maro!

En akvon salan
mi brue saltis,
naĝis

kaj naĝis
kaj poste haltis:

Kion mi volas?
Kial la koro
tiel bolas?
Kial mi miras?
Ana min admiras.

Mi renaĝis
kure
haste
ĝis la bordo
kaj al Ana
ĉar mi volis
senprokraste
konfesi la amon.
Certe ŝi diros
al mi la samon.

Sed rapide
mi divenis:
estis vana
mia sperto -
tiu Ana
jam promenis
kun Roberto.

Kongreseto estis
infana
internacia,
en kiu Ana
preskaŭ fariĝis
mia.

kongreseto kun

ANA

Radojica Petrović,

Jugoslavio



VORT-KLARIGOJ
pado: vojeto
pasie: kun granda sen-
to
svarme: mult-nombre
en grupo
ĵuri: diri certe
boli: bobeli pro varmo
konfesi: malkaŝi.

La ludanto dekstre de
vi diros literon de la
E-alfabeto. Vi devas
diri ene de minuto ek-
de tiam Esperantajn
vortojn, kiuj komen-
ciĝas per tiu litero.
(Nomoj de personoj,
urboj ktp. ne validas).
Antaŭeniru tiom da
paĝoj, kiom da ĝustaj
vortoj vi diris.

Perantoj en tri novaj landoj

En la sekvaj listoj, la kvar ciferoj rilatas al la poa kosto de unu abono, de 2 ĝis 5, de 6 ĝis 24 kaj por pli ol 25 ekzempleroj sendendaj al unu adreso.


● **Irano:** Ni anoncas peranton, s-ro Morteza Mirbaghian, P.O. Box 37185-3331 Qom. 700, 600, 500 aŭ 400 tumanoj. Tio ekvivalentas al 350 HUF, 6 DEM aŭ 4 USD aŭ 7 internaciaj respond-kuponoj.

● **Nederlando:** Ni anoncas peranton, s-ro Hans Ten Hagen, la ILEI-sekciestro, Middenweg 587, NL-1704 BH Heerhugowaard; tel. (02207-17918). Poŝtĉekonto: 6808931 (H. ten Hagen inz. Juna amiko). 16, 12, 10, 8 NLG.

● **Portugalio:** Nova peranto estos Portugala Esperanto-Asocio, Rua Dr. Joao Couto 6, R/C-A P-1500 Lisboa. 2000, 1800, 1750, 1600 PTE.

Tiuj perantoj ankoraŭ akceptos abonojn por 1994 aŭ jam por 1995! La plena listo de perantoj aperas ĉiujare en la tria numero.

Ni ĝojas anonci jam nun al perantoj kaj abonantoj, ke spite ĉiam altiĝantajn pres- kaj afrank-kostojn, la abon-kotizoj por 1995 en okcidentaj (konverteblaj) valutoj restos senŝanĝaj.



Antaŭeniru unu paĝon por ĉiu sezono, kiun vi povas nomi en Esperanto.

Klubo de legantoj

La rubrikon gvidas:

Josef Chvosta, Dr. Horáková 16.268, 29001 Pobebrady, Ĉeĥio
Sendu viajn solvojn ene de du monatoj. Solvoj estos rekompencataj.


Diligenta studento preparis lernotajn temojn por sia ekzameno. Li skribis temon kaj la tempo-punkton (la jaron aŭ jarcenton), kiun la temo okupis en la historio. Sed se vi bone legos la tekston, vi komprenos, ke la du partoj estas miksitaj. Ĉu vi helpos trovi, kiu evento apartenas al kiu tempo?

Temo aŭ evento:

1. Migrado de nacioj kaj falo de okcident-eŭropa imperio
2. Foriro de la profeto Mahometo el Mekko al Medino en Arabio
3. Granda franca revolucio
4. Sendependiĝo de la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Nord-Ameriko
5. Konstruado de la piramidoj en Egiptio
6. Navigado de Cristobal Colon okcidente, serĉante Japanion aŭ Hindion, sed li trovis Amerikon
7. Atom-bomboj uzitaj kontraŭ la japanaj urboj Hiroŝima kaj Nagasaki
8. Ekologia konferenco en Rio de Ĵanejro, Brazilo
9. La unuaj eŭropaj navigadoj atingis Aŭstralion

Jaro aŭ tempo-punkto

- A: Aŭgusto 1945
B: La 17a jarcento
C: La jaro 1492
Ĉ: La 5a jarcento
D: La jaro 622
E: Junio 1992
F: La tria jarmilo antaŭ nia epoko
G: La jaro 1776
Ĝ: La jaro 1789



Reiru tiom da paĝoj, kiom estas via aĝo.
(Se vi estas pli ol dudek-jara, reiru ĝis paĝo kvin)

LA FABELO PRI LA FELIĈO

Erich Kästner

Sepdek jarojn certe li havis, la maljunulo, kiu sidis vid-al-vide de mi en la fum-plena drinkejo. Lia hararo aspektis kvazaŭ neĝis sur ĝin, kaj la okuloj fulmis kiel purigita glaciejo. "Ho, kiom stultaj estas la homoj", li diris kaj skuis la kapon tiel, ke mi pensis, tuj devus eksalti neĝeroj el lia hararo. "La feliĉo ja ne estas salamo, de kiu oni povus fortranĉi peceton ĉiutage!"

"Ĝuste", mi diris, "la feliĉo prezentas absolute nenion fumajitan. Kvankam..."

"Kvankam?"

"Kvankam vi ĵus aspektas, kvazaŭ en via hejma kamen-tubo pendus ŝinko de feliĉo.

"Mi estas escepto", li diris kaj trinkis unu plengluton. "Mi estas escepto. Nome mi estas tiu homo, kiu disponas pri plenumenda deziro."

Ekzamenante li rigardis mian vizaĝon, kaj tiam li rakontis sian historion. "Tio okazis antaŭ longe, li komencis kaj apogis sian kapon sur ambaŭ manoj, 'tre longe. Kvardek jarojn. Mi estis ankoraŭ juna kaj suferis je la vivo kvazaŭ je ŝveliĝinta vango. Kiam iun tagmezon mi kaŭris amar-senta sur verda benko en parko, eksidis apud mi maljunulo kaj diris incidente: 'Do, bone. Ni pripensis la aferon. Ci* disponas pri tri deziroj.' Mi gapis en mian gazeton kaj ŝajnigis, ke mi aŭdis nenion. 'Deziru kion ajn ci volas', li daŭrigis, 'la plej belan virinon aŭ plej multe da mono aŭ la plej imponajn lipharojn — tio estas cia afero. Sed iĝu feliĉa finfine! Cia malkontenteco ŝiras niajn nervojn.'


Li aspektis kiel Sankta Nikolao en civila vestaĵo. Blanka plenbarbo, ruĝaj pomvangetoj, brovoj kvazaŭ faritaj el kristnask-arba vato. Nenio freneza. Eble iomete tro bonkora. Rigardinte lin intense mi denove gapis en mian gazeton. 'Kvankam ja ne koncernas nin, kion ci faras kun tiaj tri deziroj', li diris, 'kompreneble ne estus eraro, se unue ci meditus pri la afero tre bone. Ĉar tri deziroj ne estas kvar deziroj aŭ kvin, sed tri. Kaj en la kazo, ke poste ci estos ankoraŭ enviema aŭ malfeliĉa, ni ne kapablos helpi cin nek nin.'

Mi ne scias, ĉu vi povas imagi mian situacion. Mi sidis sur benko kaj estis en malpaca humoro kontraŭ Dio kaj la mondo. De malproksime sonis la tramoj. Ie la gardistoj tambure kaj trumpete marŝis al la palaco. Kaj apud mi sidis tiu aĉa klaĉemulo."

"Ĉu vi koleriĝis?"

Se vi estas knabino aŭ virino, iru tri paĝojn antaŭen, se knabo aŭ viro, reiru tri paĝojn.

”Mi ja koleriĝis. Mi sentis min kiel kaldrono tuj antaŭ kreviĝo. Kaj kiam li estis denove malfermonta sian avecan buŝeton, mi elŝutis tremante pro furiozeco: ”Por ke vi, azenaĉo, ne plu ciumu min, mi permesas al mi mian unuan kaj plej fortan deziron — iru al la diablo!” Tio estis nek bela nek ĝentila, sed mi simple ne povis reagi alimaniere. Alikaze mi estus krevinta.”



”Kaj?”

”Kio, kaj?”

”Ĉu li estis for?”

Ha, jes! Kompreneble li estis for! Kvazaŭ forblovita. En la sama sekundo. Dissolviĝis en nenion. Mi eĉ rigardis sub la benkon. Sed ankaŭ tie li ne estis. Mi sentis vomemon pro timo. La afero pri la deziroj ŝajnis ja vera! Kaj la unua deziro jam estis realiĝinta! Terure! Kaj se efektive ĝi estis realiĝinta, tiam la simpatia, kara, bonkora avo, kiu ajn li ja estu, ne nur estis for, ne nur malaperis de sur mia benko, ne, tiam li estis nun ĉe la diablo! Tiam li estis en la infero!

’Ne stultumu’, mi diris al mi mem.

’Infero ja tute ne ekzistas, same ankaŭ ne la diablo.’ Sed la tri deziroj, ĉu ili ekzistis? Kaj tamen, apenaŭ mi estis dezirinta tion, la maljunulo malaperis ... Mi sentis varmegon kaj malvarmon. Miaj genuoj tremegis. Kion mi faru? La maljunulo devis reaperi, ĉu infero ekzistas aŭ ne. Tion mi ŝuldis al li. Mi do devis elspezi mian duan deziron, la duan el la tri eblaj, ho, mi bovaĉo! Aŭ ĉu mi estu lasinta lin tie kie li nun estis? Kun liaj bele ruĝaj pomvangetoj? Vangetoj kiel bakitaj pomoj, mi ekpensis terurigita. Mi ne havis alian elekton. Mi fermis la okulojn kaj flustris timeme: ’Mi deziras, ke la maljunulo sidu denove apud mi!’ Vi sciu, ke dum multaj jaroj, eĉ dum sonĝoj, mi faris al mi mem la plej terurajn riproĉojn, ke la duan deziron mi malŝparis tiamaniere, sed tiutempe mi ne vidis alian solvon. Ja ne ekzistis alia ...”

”Kaj?”

”Kio, kaj?”

Antaŭeniru al paĝo 29 se vi povas diri la familian nomon de la kreinto de Esperanto. Al paĝo 30 se vi povas krome diri unu el liaj antaŭnomoj. Al paĝo 31 se vi povas krome diri la jaron, en kiu li publikigis la Unuan Libron de Esperanto. Se vi krome povas diri ĉu lian naskiĝo-jaron, ĉu lian morto-jaron, iru al paĝo 32 kaj gajnu!

”Ĉu li reaperis?”

”Ha, jes! – Kompreneble li reaperis! En la sama sekundo. Denove li sidis apud mi, kvazaŭ li estis neniam forŝorĉita. Tamen, oni ja konstatis, ke li ... ke li estis ie, kie estis diablece, mi volas diri, kie estis ege varmege. Ho, jes. La dikaj blankaj brovoj estis iomete bruligitaj. Kaj la bela plenbarbo ankaŭ iom suferis. Precipe ĉe la randoj. Krome estis odoro kiel bruligita ansero. Li rigardis min riproĉe. Poste li prenis barbobroseton el la poŝo, brosis barbon kaj brovojn kaj diris ofendita: ’Aŭskultu, juna sinjoro, ĝentile vi ja ne konduktis!’ Mi balbutis pardonon kaj diris, ke mi tion bedaŭras. Mi ja ne estis kredinta je la tri deziroj. Kaj krome mi ja provis rekompenci la damaĝon.

’Tio estas ĝusta’, li respondis. ’Estis ja urĝa afero!’ Poste li ridetis. Tiom afable li ridetis, ke preskaŭ mi larmis. ’Nun estas ankoraŭ nur unu deziro je via dispono’, li diris, ’la tria. Espereble ĝin vi traktos iom pli atente. Ĉu vi promesas tion al mi?’ Mi kapjesis. ’Jes’, mi respondis tiam, ’sed nur kondiĉe, ke denove vi ciuos min.’ Tuj li ekridis. ’Bone, knabo mia’, li diris kaj etendis al mi la manon. ’Adiaŭ. Ne estu tro malfeliĉa. Kaj atentu pri cia lasta deziro.’ ’Tion mi promesas al vi’, mi respondis solene. Sed jam li estis for. Kvazaŭ forblovita.’

”Kaj?”

”Kio, kaj?”

”Ekde tiam vi estas feliĉa?”

”Ha, jes. – Feliĉa?” Mia kunsidanto leviĝis, prenis siajn ĉapelon kaj mantelon de la vestejo, rigardis min per siaj viglaj okuloj kaj diris: ”La lastan deziron mi ne tuŝis dum kvardek jaroj. Kelkfoje mi estis preskaŭ preta. Sed ne. Deziroj estas nur bonaj, kiam ili estas ankoraŭ je dispono. Adiaŭ!”

El la fenestro mi observis, kiel li transiris la straton. Neĝeroj dancadis ĉirkaŭ li. Kaj li ja tute forgesis diri al mi, ĉu almenaŭ li nun estas feliĉa. Aŭ ĉu intence li ne respondis al mi? Tio ja ankaŭ povas esti.

Tradukis: Nora Caragea, Germanio

Tradukita laŭ speciala permeso de la eldoninto de la originala verko.

Antaŭeniru unu paĝon por ĉiu Esperanta verkisto, kiun vi povas nomi ene de unu minuto.

Vortklarigoj

skui: movi tien kaj reen
salamo: bonkvalita kolbaso
escepto: io, kio ne sekvas la kutiman
regulon
apogi: subteni
suferi: malbonfarti
kaŭri: sidi sur-genue
amara: mal-dolĉa
incidente: flanko, preter-pase
gapi: rigardi grand-okule
koncerni: rilati
humoro: mensa stato
klači: paroladi kun nebona intenco pri
iu, kiu forestas
kaldrono: kuira potego
krevi: eksplode dis-salti
furioza: kolerega
riproĉo: kritika diro
forŝorĉita: malaperigita per magio

* CI kaj CIUMI

Ci estas pronomo, kiun Zamenhof metis en Esperanton, sed kiun uzas nur parto de la esperantistoj. Ĝi estas alternativo al 'vi'. Multaj lingvoj havas du pronomojn por esprimi 'vi', tio estas, la homo al kiu vi parolas (gramatike: la dua persono). Unu estas pli formala, unu pli amika. Ĉi tiu rakonto bezonas la distingon inter la uzo de tiuj du formoj, do ĝi uzas la zamenhofan 'ci'. 'Ciumi iun' signifas alparoli tiun per la amika aŭ intima pronoma formo.

Korespondi deziras

Alĝerio

Chikhi Fouzi, 24-jara studento de komerca mastrumado, deziras korespondi. Li estas komencanto en Esperanto kaj skribis franc-lingve.

Francio

Jérôme Martin, Sous-Etiaz, F-74140 Massongy, 10-jara knabo dez. kor. kun knaboj, interŝanĝi pm. kaj pk.

Skribu al Jorgos Comte, St. Felix de Rieutort, F-09120 Varilhes, por ricevi tut-paĝan liston de korespondemaj junuloj en Okcitanio (aĝoj 9-ĝis 18-jaraj)

Hungario

La skolta klubo Sik Sándor, Pesti u. 113, H-1173 Budapest, volas riĉigi sian programon per korespondado tutmonde.

Kubo

Efrain Padre Garcia, c/o Mendao Mora y Callejon de Sto. Domingo, Manacas Villa Dora, CU-54510, 17-jara junulo, dez. kor. tutmonde.

Litovio

Odeta Dančiunaite, Partizany 176-14 LT-3041 Kaunas, 16-jara, interesiĝas pri klasika muziko, literaturo, lingvoj.

Andrius Sarcevičius, V. Kreves 45-42, LT-3042 Kaunas (muziko, lingvoj)

Inga Ajauskaite, Savano-

rim Prosp. 417-23, LT-3042 Kaunas (16-jara)

Inga Akulauskaite, Rasytis 6-37, LT-3040 Kaunas (11-jara).

Rusio

Vladimir Vyĉegjanin, Zaĥarova 10-16, Niĵnij Tagil, reg. Sverdlovskaja, RUS-622049. Instruisto de 10-12-jaraj geknaboj. Ili serĉas literamikojn en la tuta mondo kaj li volas interŝanĝi instromaterialon kaj ideojn.

Pli ol 50 korespondemaj junuloj ĉe E-klubo Laro, ab. jaŝ 913, RUS-354000 Soĉi

Ukrainio

31 lernantoj, 15-jaraj dez. kor. ĉe Mikaelo Linneckij, pk. 539/1, UA-254200 Kiev..

Vi havos konkurson kun la ludanto dekstre de vi. La ludanto maldekstre de vi diros literon de la alfabeto. Vi ambaŭ en la sekva minuto devas skribi tiom da Esperantaj vortoj kiom vi povas, kiuj komenciĝas per tiu litero. Iru antaŭen aŭ malantaŭen tiom da paĝoj, kiom estas la diferenco de viaj rezultoj (Se vi skribis pli, vi pluiros; se malpli, vi reiros.)

Parol-rimoj

prezentas: Morteza Mirbaghian, Irano/Hungario

Karaj miaj junaj amikoj, kiel vi scias proverboj ludas gravan rolon en nia ĉiutaga vivo. Jen mi prezentas al vi kelkajn miajn proprajn proverbojn, kiujn mi mem verkis pensante pri diversaj ĉiutagaj aferoj. Mi preferas nomi ilin 'parol-rimoj' pro tio, ke ili ĉiuj havas rimojn kaj krome ankoraŭ ne estas konataj en Esperantujo. Do, se iu el tiuj ĉi parol-rimoj iam akiros la bonŝancon esti vaste uzata inter vi, karaj junaj amiketoj, mi povos nomi ĝin proverbo. Sed nun estas pli bone kaj pli ĝuste nomi ilin parol-rimoj. Mi esperas, ke ili plaĉos al vi.

* * * * *

La plej bona mesaĝo estas tiu de saĝo.

Kiu estas ĝentila, ĉie estas brila.

Ofte bona humoro, pli utilas ol oro.

Neinvitita gasto, venas, iras en fasto.

La plej doloriga bato, estas tiu de konato.

Sciu, ke silento ne signifas: konsento.

La plej forta ordono, estas tiu de mono.

Eĉ al la reĝa korto, abrupte venas sorto.

Kun lupu kaj kun urso, ne iru al ekskurso.

De multfoja vojaĝo, plifortiĝas la saĝo.

Rajdante sur ĉevalo, ne timu de ŝakalo.

Merito de ĉevalo, pruvigas en batalo.

Kun malsana ĉevalo, ne iru al batalo.

La rimvorto de "vero", ofte estas "sufero".

Malaperas kolero, per iom da tolero.

La kora spegulo, estas homa okulo.

Kiam la mono sonas, homo homon ne konas.


Kie regas mizero, ne vikle vivas vero.

Se vi akiras monon, tuj per ĝi faru bonon.

Ne konatiĝas homo, laŭ aspekto kaj nomo.

Zorgu, ke sur la tero, sankta estu la vero.

Ju pli afabla, des pli kapabla.



Se vi povas en unu minuto nomi poemon aŭ libron en Esperanto, iru al paĝo 31. Se ankaŭ la aŭtoron vi povas nomi, iru al p. 32 kaj gajnu! Se vi ne- tion povas diri, reiru al p 24.

Ĉu vi mem povas elpensi similajn parol-rimojn? Eble vi povos ilustri kelkajn el tiuj prezentitaj supre! Ĉiu en la grupo faru desegnaĵon por unu parol-rimo kaj poste laŭvice montru la bildojn. La aliaj grupanoj devas diveni, pri kiu parol-rimo temas. Ni prezentos pliajn en estonta numero!

Provizore enketile

Ĝis hodiaŭ alvenis nur dek sep el la enketiloj, kiujn ni dissendis en nia antaŭa numero: 1 el Argentino, Finnlando, Kanado, Nov-Zelando, kaj Tanzanio; po 2 el Germanio, Pollando kaj Usono; po 3 el Francio kaj Hungario. 11 respondintoj estas instruistoj kaj 4 lernantoj. Ni analizos la respondojn detale nur en nia posta numero, kiam esper-eble estos alvenintaj multe pli da respondoj. Nun ni prezentas analizon nur pri du demandoj. La demandoj pri ŝato de diversaj rubrikoj donis interesan rezulton:

	Tre	iom	Ne
Fabeloj	10	5	0
Raportoj	10	6	0
Skeĉoj, dialogoj	9	6	0
Rol-ludoj	5	8	1
Kantoj	5	7	2
Poemoj	3	6	7
Esperantaj novaĵoj	11	3	2
Tabul-ludoj	7	7	0
Bild-strioj	8	6	1
Kruc-enigmoj	9	5	1
Konkursoj	6	9	1
Korespondi deziras	10	4	1

Unu leganto ne respondis detale, skribante nur 'ĉio en ĝustaj kvantoj'. Du hokis nur kelkajn el la rubrikoj. Alia respondis 'tre' por ĉiu rubriko. La respondoj estas entute sufiĉe favoraj; la sola rubriko, kiu altiras signifan malaprobos estas poemoj. 16 el 17 respondintoj preferas pli da gramatikaj artikoloj aŭ legaĵoj ligitaj al gramatiko. Tion ni ne imagis! Ne timu, la gazeto ne transformiĝos al seka gramatika lernolibro, tamen ni notas tiun deziron. Se vi estas unu el la legantoj, kiuj ne resendis la enketilon, tuj retrovu numeron 94/1, plenskribu kaj sendu ĝin al ni!

Ankaŭ la redaktoro iras...

Via redaktoro en la venonta semajno (Junio 17-24) faros tri vojaĝojn: unu kun la familio, du solaj. La tuta familio (Maria kaj infanetoj Karina kaj Hajnal) kaj pluraj kubaj metroj da mebloj, vestaĵoj, ludiloj, libroj, skrib-maŝino, E-gazetoj kaj dokumentoj transloĝos el la hungara ĉefurbo al vilaĝo 25 kilometrojn sude de ĝi, Erd. Do, la laboro por fin-redakti ĉi tiun numeron de *Juna amiko* okazas space inter plenegaj kartonaj skatoloj, kaj tempe inter febraj provoj duonorde pleniĝi ankoraŭ pli da kestoj.

Do, ne plu uzu la malnovan hejman adreson en Pluvo-strato (Esò u.); uzu la poŝtkestan adreson de *Juna amiko* por ĉiuj komunikaĵoj.

La dua vojaĝo sekvas nur du tagojn post la unua, temos pri iom pli ol 25 km. kaj iom malpli da akompanaj pakajoj. La veturilo estos aviadilo *Jumbo*, kun la ĝusta nombro da motoroj (4), malkiel tiu sur la kovrilo de *JA 92/2*, kie la artisto erare forigis du el ili. La celo estas Sanfrancisko kaj la universitataj kursoj tie. Dum tri semajnoj studentoj el diversaj landoj praktikos Esperanton en kvar grupoj. Tiuj sub la gvido de via redaktoro studos el – ne surprize – *Tendaraj tagoj*. La kursoj multe laboros kaj ricevos hejm-taskojn. Unu estos verki kontribuadon por *Juna amiko* per simpla lingvaĵo, uzanta nian vort-liston. Do, atendu en la venonta numero buntan kolekton da freŝaj ideoj el Ameriko!

Kaj la tria vojaĝo? Ho, jes! Al la presejo kun ĉi tiu *Juna amiko*!

Kaj nun mi salutas kaj foriras, ĉar mi devas iri, iri kaj iri!

Stefan MacGill, 17 junio 1994

Se vi povas diri en unu minuto dek verbojn en Esperanto, kiuj priskribas manieron 'iri', iru antaŭen kaj gajnu! Se vi ne sukcesas, reiru tiom da paĝoj, kiom da verboj mankis.



Per kiu vi preferas
vojaĝi – aŭto aŭ ĉevalo?
Kial?
Kian aŭton vi ŝatus?
Kian ĉevalon vi ŝatus?

Gratulon! Se vi atingis aŭ rajtas pasi ĉi
tlun paĝon, vi gajnis la ludon! Via pre-
mio estas senpaga senlima restado en
la Triangulo de Bermudo (se la aliaj lu-
dantoj pagos vian flug-bileton aŭ dona-
cos al vi rem-boaton kaj kompanion!)